

# REVUE

# FRANÇAISE

# D'ESPERANTO

# FRANCA ESPERANTISTO


Fondée en 1908 — 37<sup>e</sup> année — 3<sup>e</sup> série — N° 259 — Juillet - Octobre 1969

ATENDANTE  
LA  
KONGRESON  
EN  
MONTE-KARLO  
IOM  
DA  
HISTORIO  
PRI  
MONAKO

La Princa domanaro de Monako apartenas al la familio GRIMALDI, kies historio estas intime ligata al tiu de la Princlando. Ĝi devenas al Genovo, kie ĝi a unua konata praulo, Otto Canel-la, adoptis iam poste kiel patronomon la baptonomon de la plej juna filo, Grimaldo, kiu estis ambasodoro apud Frederiko Barberousse kaj Manuelo Comnène, imperiestro de Bizanco.

Kiam je la fino de la XIIIa jarcento la bataloj inter la Gelfoj kaj Gibelinoj devigis la Grimaldojn forlasi la landon kaj rifuĝi al Provenco, Francisko Grimaldi, vestita per monaĥa mantelo, sukcesis surprizatake enŝovi grupon da partizanoj en la fortikaĵon de Monako. Tiel la Grimaldi iĝis mastroj de la fortika loko, kie ili fondis dinastion. La blazono de la Princa Familio, sur kiu troviĝas du monaĥoj tenantaj spadon, rememorigas tiun eventon.

Dum la tuta XVa j.c. kaj la unua parto de la XVIa, la fortikaĵo de Monako, vera riglilo kapabla bloki la komunikojn inter Provenco kaj Genovo, ekscitis la avidecon. La GRIMALDI, spertaj diplomatoj, praktikis subtilan baskulpolitikon. Oni trovas ilin alterne aliancanoj (daŭrigo sur paĝo 52a)



# FRANCA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE U.F.E. (Unuiĝo Franca por Esperanto)

34, Rue de Chabrol, Paris X<sup>e</sup> - C.C.P. 855-35 Paris

ABONNEMENT ANNUEL : 30 Francs. — Le Numéro : 3 Francs (CCP 855-35 PARIS)

## COTISATIONS

=====

### Rédaction provisoire :

**J.-A. ROUSSEAU**

U.F.E., 34, rue de Chabrol  
PARIS (10<sup>e</sup>)

Les textes à publier doivent être toujours dactylographiés avec double marge et double interligne.

Prière d'envoyer des clichés et non de simples photographies.

Les manuscrits non insérés ne sont pas renvoyés.

Joindre 0,80 F. en timbres pour tout changement d'adresse.

### BUREAU DE L'U.F.E. :

#### Président :

Dr André ALBAULT, 32, av. E.-Billières, 31 - TOULOUSE - 03.

#### Vice-présidents :

Gabriel ROUGETET (Relations extérieures, statuts), 71 ter, avenue Foch, 78 - SAINT-GERMAIN-EN-LAYE.

THIERRY Jean (affaires culturelles, enseignement extra scolaire), 5, rue Léon-Cogniet, 75 - PARIS-17<sup>e</sup>.

J. GUILLAUME (relations avec l'U.E.A., secrétariat administratif), 8, rue Camille-Saulnier, 78 - Le VÉSINET.

F. BOYET (G.E.E., enseignement dans les écoles), 3, rue Lebas, 49 - ANGERS.

#### Secrétaire Général :

André BOURDEAUX (affaires générales, information, relations avec la presse, Esperanto-Actualités), chez U.F.E. 34, rue de Chabrol PARIS 10<sup>e</sup>

#### Secrétaire général adjoint :

Mme BALLAVEN (affaires générales), 18, avenue de Villiers, 75 - PARIS (17<sup>e</sup>)

#### Secrétaire chargé des finances :

Pierre ROYER, Estérel n° 2 ; 49, rue de Chatenay ; 92 - ANTONY

#### Trésorier :

J.A. ROUSSEAU, 64, avenue J.-Moulin, 75 - PARIS (14<sup>e</sup>).

### U. F. E.

|   |            |
|---|------------|
| Membre Titulaire .. .. .                      | 30,-       |
| Membre titulaire junior (- de 21 ans) .. .. . | 15,-       |
| Membre Donateur .. .. .                       | 45,-       |
| Membre Bienfaiteur .. .. .                    | 75,-       |
| Membre Titulaire à Vie . . . . .              | 600,-      |
| Membre Donateur à Vie . . . . .               | 900,-      |
| Membre Bienfaiteur à Vie .. .. .              | 1500,-     |
| <b>Membre Adhérent</b> .. .. .                | <b>6,-</b> |

### U. E. A.

(ces cotisations s'ajoutent aux précédentes)

A la suite de la dévaluation du franc d'une part et de l'augmentation décidée par U.E.A. les montants de ces cotisations ont été modifiés et les nouveaux taux figurent à la page suivante (Oficialaj komunikoj de U.F.E.)

-----

## ABONNEMENTS

|                           |       |
|---------------------------|-------|
| Biblia Revuo              | 33,50 |
| Brit. Esper.              | 16,50 |
| Bulgario                  | 16,75 |
| Dokum. CED.               | 8,60  |
| Popola Ĉinio              | 7,75  |
| (2j=11,65 3j= 15,50)      |       |
| Esper <sup>o</sup> -Revuo | 35,00 |
| Gepatra Bult.             | 5,50  |
| Heroldo                   | 23,50 |
| Homo/Kosmo                | 8,60  |
| Kult.Kajeroj              | 7,00  |
| Lanterno                  | 14,00 |
| La Monda                  |       |
| Lingvo-problemo           | 37 F  |
| Norda Prismo              | 15,50 |
| Oomoto                    | 9,30  |
| Praktiko                  | 18,50 |
| Kontakto                  | 12,50 |
| Turista Mondo             | 13,00 |

## COURS DES DEVICES

Nous prions nos membres d'utiliser les cours ci-dessous pour leurs commandes et règlements divers:

|                |       |
|----------------|-------|
| Angla pundo    | 13,25 |
| Aŭstra ŝilingo | 0,25  |
| Belga franko   | 0,12  |
| Dans krono     | 0,75  |
| Germana marko  | 1,40  |
| Guldano        | 1,55  |
| Kanada dolaro  | 5,15  |
| Liro           | 0,009 |
| Norvega krono  | 0,80  |
| Peseto         | 0,10  |
| Sveda krono    | 1,10  |
| Svisa franko   | 1,30  |
| Usona dolaro   | 5,55  |

Oktoĥro monato de la kursoj, oktobro monato de la kotizoj, oktobro monato de la abonoj oktobro monato de la kursoj, oktobro monato de l

**FEDERACIOJ** - Post interkonsento inter la federacioj Centra-Montaro kaj Sudfrancio  
 ----- Pireneoj, tiu lasta federacio nun zorgas pri la departementoj LOT k  
 Aveyron, kiuj aldoniĝas al la ses departementoj de tiu regiono, nome Haute-Garonne  
 Ariège, Tarn, Tarn-et-Garonne, Gers, Hautes Pyrénées.

**Provenca federacio:** Jen la listo de la komitatanoj por la jaroj 1969-70-71:

Honora Prezidanto: S-ro GASSE Emile (Hyères)

Prezidanto.....: S-ro GARRIGUE François (Marseille)

Vicprezidantoj...: S-ro FERREZ Hubert (Nice)  
 S-ro JULLIEN Marcel (Aix-en-Provence)  
 F-no TRIOLE Renée (Marseille)

Sekretario.....: S-ro SARETTO Paul (Marseille)

Kasistino.....: S-ino JURQUET D. (Marseille)

|              |                           |                                   |
|--------------|---------------------------|-----------------------------------|
| Membroj..... | S-ro AMAT Lucien (Toulon) | S-ro BOURDELON Honoré (Marseille) |
|              | S-ro DEYROLLES André      | S-ino HUMM Simone (Avignon)       |
|              | S-no JURQUET C. (Toulon)  | S-ro MATHIS Aug. (Solliès-Pont)   |
|              | F-no NOURMONT C. (Aix)    | S-ro PAZZINI Norbert (Nice)       |
|              | S-ro SALLES M. (Hyères)   |                                   |



**KOTIZOJ** - Depost la devaluto, la kotizoj 1969 de U.E.A. estas fiksitaj laŭ la ĉi-  
 ----- suba kalkulo: (en frankoj)

MJ 19,25 MA/MA.K 38,50 MS 57,50 JMJ 9,75 JMA 28,75

Simpla abono al Esperanto: 28,75 - Abono al la PRAKTIKO: 18,50 F.

Por 1970, ĉar la Komitato decidis en Helsinki altiĝi la membro-kotizojn, bonvolu  
 noti ke vi devos pagi (en frankoj):

MJ 23,00 MA/MA.K 46,00 MS 69,00 JMJ 11,50 JMA 34,50

Simpla abono al ESPERANTO: 34,50 - Abono al la PRAKTIKO: 18,50 F.

Ĝis la fino de 1969 la DM-kotizo restas fiksita je 770 f; Kaptu tiun okazon, ĉar  
 poste vi devos pagi 920 F.!

**KONGRESA REGULARO** - La Konsilio, dum sia kunveno de la 7/9/69, aprobis Kongresan  
 ----- Regularon, kies teksto aperos en iu venonta numero de la revuo:

**ESPERANTO ACTUALITES** - Speciala numero aperos en Januaro 1970. La grupoj kaj fe-  
 ----- deracioj estas petataj antaŭmendi sufiĉe grandan kvanton.

**DEMANDAROJ** - La Federacioj baldaŭ ricevos demandarojn dissendotaj al siaj grupoj  
 ----- kaj ankaŭ al izoluloj, kiuj bonvolu noti, ke ili devos NEPRE resen-  
 di ilin, plenigitaj, REKTE al la Federacioj.

**KULTURA SEMAJNO 1970** - Ĝi okazos de la 21a ĝis la 29a de marto 1970 (Oasko);dume  
 ----- estos ankaŭ aranĝita staĝo por respondeculoj pri informa-  
 do.

**KAMPANJO DE REZOLUCIOJ** - La Konsilio aprobis la projekton de rezolucio-kampanjo,  
 ----- laŭ propono de S-ro Cristofol (Toulouse), kaj proponos  
 al la membroj tekston de rezolucio kaj instrukciojn por ĝia uzo.

MONAKO (daŭrigo).....de la ĝenova respubliko, de la Duko de Milano, de la Duko de Savojo, de la francaj reĝoj Karolo-la-VIII-a kaj Ludoviko la XII-a, fine de la respubliko de Florenco, kies reprezentinto, la fama Machiavel Nikolao, venis por subskribi traktaton. Ili ne nur sukcesis firme teni, sed eĉ plifortigi, sian sendependecon. Luciano Grimaldi akiris, la 20-an de feb.1512, atestleteron de Ludoviko XIIa, agniskanta ke la Sinjorlando estas tenata nur de Dio kaj de la spado!

En 1612, Honorato la II-a firmigis ankoraŭ sian suverenecon, prenante la titolon de Princo, kaj subskribis amikecan traktaton kun Francujo.

Dum la lastaj cent jaroj sinsekvis la reĝadoj de Princoj Karolo-la-IIIa (1850-1889), Alberto-la-I-a (1889-1922), kaj Ludoviko-la-II-a (1922-1949). Depost 1949, estas Princo Rainier-la-III-a, kiu prezidas la destinojn de la Princlando. En 1956, li edziĝis al S. S.M. Princino Grace, kaj el tiu edzeco naski-

ĝis ŝ.s.m. Princino Karolina, L.S.M. Princo Alberto (hereda princo), kaj ŝ.s.m. Princino Stefano.

La palaco de Monako, loĝejo de la princa familio, estis fondita en 1215. Multe pli grandigita kaj plibeligita dum la jarcentoj, ĝi estas la centro de la historio de la Princlando, kaj enhavas neestimeblajn riĉaĵojn, arĥivojn kaj kolektojn de artaĵoj.

La Nacia Monaka Festo okazas la 19-an de Novembro. La Princa devizo estas "Deo Juvante". La princa flago estas blanka kun en la centro la princa blazono, dum la nacia flago estas duonparte ruĝa kaj blanka laŭ horizontalaj strioj.

Princo Alberto-la-I<sup>a</sup> estis scienculo, membro de la Scienca Akademio en Parizo. Li subskribis, kun aliaj membroj de tiu Akademio, favoran rezolucion por Esperanto.

o  
o o  
o

62-a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO kaj  
2-a RENKONTIĜO FRANCA MONAKA ITALA

MONTE - KARLO

=====

15 - 19 MAJO 1970

I-a Komunikilo

La aliĝkotiĝo estas fiksita jene:

|                            | ĝis...31/12 | 28/2 | 10/5 |
|----------------------------|-------------|------|------|
| Kongresan(in)o             | 18 F        | 20 F | 25 F |
| Edz(in)o de kongresan(in)o | 9 F         | 10 F | 12,5 |
| Gejunuloj de 15 j. ĝis 25j | 9 F         | 10 F | 12,5 |

malpli ol 15 j. senpaga aliĝo

Ekzamenoj: Dum la kongreso estos ----- aranĝita sesio por ekzamenoj. La interesatoj devos s in anonci antaŭ la 28.2.1970

ENVOYEZ VOS VŒUX EN ESPERANTO

En accord avec l'U.F.E., la Société Toulousaine pour l'Espéranto vous présente une série de six cartes avec vœux de fin d'année en Espéranto.



Devant le succes obtenu l'an dernier (nous n'avons pu satisfaire tout le monde), nous vous engageons à passer rapidement vos commandes. Les conditions sont les suivantes :

La série de 6 cartes différentes .. 9 F. franco  
2 séries : 12 cartes ..... 16 F. franco  
10 séries : 60 cartes ..... 70 F. franco

Veuillez joindre votre paiement à la commande, de préférence un virement postal, au nom de la Société Toulousaine pour l'Espéranto, 3, rue Roquelaine, 31 - Toulouse, 01 - C.C.P. 1836.67.



Rakonti nur per kelkaj linioj nian rondiradon ĉirkaŭ Finnlando estas malfacile.

Kion diri pri tiu ĵus finita vojaĝo?

Finnlando estas lagoj, maroj, insuloj arbaroj de pinarboj kaj betuloj, herbejoj kaj sekiganta fojno, malgrandaj lignaj dometoj ĉiam zorge pentritaj kaj akompanataj de saŭnejoj.

Kaj tuj mi devas paroli pri saŭno, kiun oni proponis al ni ĉiuvespere, post la vespermanĝo, kiam ni estis sur la kamparo. Tre malmulte ĉi ni sukcesis elteni tiun tiom varman vaporbanon, akompanata de frapoj de betulaj balailoj kaj malvarma duŝo! Oni rajtas fine trinki glason da akvo kun fruktsiropo...

La tuta finnlanda kamparo estas substrekata norde suden per ĝraciaj grapoloj de rozkoloraj epilobioj.

Finnlando estas rokoj ĉie elirantaj el la tero en grandaj masoj, kiuj donas impreson de fortikeco kaj persistemo; ĉie, eĉ en la urboj, tiuj gigantaj rokoj aperas, kaj la arkitektoj uzas ilin, miksante ilin kun siaj plej modernaj konstruaĵoj.

Kaj vi opinias: "Ĉu dum dek tagoj vi vidis nur lagojn, marojn, rokojn, arbarojn? Jes, ĉiam, ĉie ni tion vidis, kaj tamen ni ne enuis, nek trovis unutona nian vojaĝon, ĉar tio estas la fundo sur kiu pentriĝas la finnlanda vivo.

Tie, dum la someraj monatoj, matenoj kaj vesperoj konas la saman gloran krepuskon: nokto malaperas!

Ĉiumomente, aperas nova detalo, kiu kaptas la atenton: jen, laŭlonge de la vojoj, dometoj, kvazaŭ pupdometoj, en kiuj la farmistoj metas ĉiutage siajn ladajn botelojn da lakto, kiuj estas aŭtomobile kolektitaj. La letterskatoloj de la farmistoj estas najlitaĵe ĉe tiuj dometoj.

Jen ankaŭ lignaj tabloj kaj benkoj proksime de malpuraĵskatolo, kiuj atendas la piedirantojn, kiuj deziras manĝi sur la kamparo.

Nun estas la unua ligna preĝejo kun ĝia aparta sonorilejo, kaj la tiel pacplena tombejo. Kiom da lignaj preĝejoj ni vidis! Kiom da kvietaj florplenaj tombejoj! En tiu lando, la tombejoj estas kvazaŭ publikaj ĝardenoj, ameme prizorgataj. En unu el ili,

ni rimarkis tre simplan kaj kortuŝan monumenton: du petegantaj manoj leviĝas al tri-tikaj spikoj. Tio memorigas tiujn, kiuj mortis dum la granda malsatego de 1866-68.

Brilkolora foiro atendas nin en la unua urbeto; ni retrovos ĝin en ĉiuj aliaj urbetoj, kun la bonodoraj fragoj, riboj, vakcinoj, floroj kaj ĉa diversajoj ellaboritaj el betula ŝelo. Tie la koloroj de la roboj, kune kun tiuj de la fruktoj, legomoj, floroj, faras veran piroteknikaĵon. Pizoj, terpomoj, fragoj, ktp. estas vendataj politre.

Ofte kelkaj ciganinoj promenas belajn longajn velurajn robojn kun punktojn en la homamaso.

Tiu homamaso estas sufiĉe silenta; oni ŝajnas ne vidi nin, oni preskaŭ ne respondas al niaj ridetoj aŭ mansignoj; aŭ se oni respondas, estas tre diskrete. Nia petolema grupo kelkfoje mirigis, kaj eĉ malkvietigis la ĉeestantojn, ĉefe kiam ni brue serĉis ĉirkaŭ la granda tablo, kie ni elektis ĉion kion oni proponis al ni por manĝi.

Ĉu Finnlandanoj estas malbonintencaj por la alilandanoj? Ne, tute ne! Ni kredas, ke ili estas sindetenaj, eĉ eble iom timemaj. Sed, se ni bezonas vere ion, se ni iras al iu el ili petante helpon, li faras ĉion eblan al si por plezurigi nin. Li kondukas nin al la celo, por esti certa ke ni ne eraras; li helpas en la restoracioj.

Ni estis akceptitaj de kelkaj: tiam, ili petas, ke ni estu hejme en ilia domo, kaj oferas ĉion, kion ili havas. Ni povis admiri la internon de la finnaj domoj bone pentritaj, arte ornamitaj per nombraj kaj belaj tapiŝoj.

La infanoj estas kvietaj. Estas facile kompreni kial, ĉar multnombraj estas la infanĝardenoj, kie ili povas ludi libere, kaj eĉ kelkfoje sin bani.

Laŭlonge de la vojoj, oni vizitigis nin plurajn firmaojn: teksejon, paperfabrikon, fabrikon de butero kaj sekigita lakto, skifabrikon, ceramikejon. Ĉiam, oni klarigas ĉion kompleze, respondas pacience al niaj demandoj.

La sento kiu animas la Finnlandanojn ne estas nura intereso; estas vera amikeco, kiu daŭras post la disiĝo de la nova amiko. Kvar Finnlandanojn vojaĝis kun ni. La unuan tagon ili ignoris nin, sed la duan ili komencis oferi al ni sukeraĵojn, kaj helpis nin laŭ sia povo. Post la akcidento de Sino S.

Rousseau, ili portis al ŝi florojn en la hospitalo. Kiam ni revenis el Leningrado, ni havis la surprizon vidi du el ili ĉe la flughaveno. Ili alportis al ni la amikan rideton de Finnlando, pere de bongustaj ĉokoladoj. Post la tri tagoj de severa kaj preskaŭ milita vivo en Rusujo, estis preskaŭ reiro en nian propran landon.

Jeannine FERRA

Ni loĝis en komforta hotelo "Europa-ŝkaĝa", kie ni povis aĉeti, per franca mono, multajn memoraĵojn.

La unuan vesperon, leningredaj samideanoj akompanis nin pere de la mondfama subtera trajno, al la esperantista kunveno. Imagu 150 sovetajn esperantistojn el 40 urboj de 10 respublikoj, kiuj aplaudis nian eniron en la ĉambregon... Le respondeculoj tuj donis al mi la perolvidon. Kompreneble, mi substrekis la koran kaj floran akcepton de la rusaj samideanoj ĉe la flughaveno, kaj mi dankis; emociite, mi eble forgesis kelkajn akuzativojn (!), sed kiam mi diris ke la francoj deziras vivi en paco kun ĉiuj popoloj, tondraj aplaudoj resonis en la salono.

Post mia peroladeto, ĉiuj francaj esperantistoj estis alvokitaj de la rusaj por subskriboj, donacetoj, petoj de malgrandaj servoj por la korespondantoj en Francujo... kaj eĉ en Hispanujo!

La aliajn tagojn, ni vizitis interalie la muzeon "Ermitage", unu el la plej belaj en la mondo, la kastelon kaj la parkon de Petrodvoretz (la rusa "Versailles") kaj diversajn imponajn monumentojn de Leningrado. Sed, tiu renkontiĝo kun la sovetaĵ samideanoj, t i u ebleco peroli libere kun ĉiuj tavoloj de la rusa popolo, restos en la menso de ĉiuj partoprenintoj, kiel la plej bonan rememoron de la vojaĝo.

Vere, estis laŭ mi kaj laŭ mia esperantista sento la plej grava kaj interesa vizito en Leningrado.

René LLECH-WALTER




**U.F.E.- KARAVANO AL LENINGRADO**



Sabaton 2an de aŭgusto, je la 12h fermiĝis en Helsinki la 54-a Univerŝala Kongreso de Esperanto, kaj dimanĉon, 3-an je 14h30, tridek partoprenantoj en la U.F.E.-karavano flugis per "Finnair" al Leningrado kaj, miraklo! ili alvenis antaŭ la 14 h., sed... mi devas konfesi ke en Leningrado oni fruas unu horon kompare kun Helsinki, kiu ankaŭ fruas unu horon kompare kun Parizo!

Ĉe la soveta dogano, ni devis plenigi slipon sur kiu ni notis ĉiujn aferojn kunportitajn, precipe la oraĵn, la devizojn, ktp... Mi notis, konsciencie, mian ringon! Se ene de la flughaveno ĉio aspektis severa ekstere, sur la trotuaro, ĉio ŝanĝiĝis. Imagu! oni akceptis nin kun floroj... ĉarmaj geknaĵoj atendis nin kaj alparolis nin en bona esperanto.

Ni havis oficialan gvidistaron de "Intourist" kiu perfekte sciopovis la francan lingvon, sed ĉiam, dum nia restado, ni povis babilu esperante kun la rusaj samideanoj, kaj tio estis tre interesa.



(Anonco)

PLENA ILUSTRITA VORTARO



ROGER MILON - 49, avenue Alsace-Lorraine (19) Brive, interŝanĝas premiojn duonkuponojn de lavpolvero BIO AJAX.

La eldonisto informas, ke li povos liveri verŝajne antaŭ la fino de la jaro, la libron al la mendintoj kiuj jam pagis

o . . .

Jam finiĝis la ferioj por ĉiuj, kaj venas nun la tempo pripensi nian agadon por la nova laborperiodo 1969-1970.

Post la marŝado de homoj sur la luno, ĉiu el ni certe konsciis pri la graveco de la momento kaj la "plane-diĝo" de nia terglobo, laŭ la vortoj de Teilhard de Chardin "igas aŭ.... devus ifi la teranojn pli solidarajn ol antaŭe. Sed, ni, esperantistoj, bone scias, ke tiu evento ankoraŭ pli akriĝos la lukton inter superevoluiĝintaj landoj, kiuj de longe revas pri la superregado de siaj kulturoj, lingvoj kaj ekonomiaj fortoj.

Pensu ni pri tiuj esencaj problemoj; kaj, konsekvence ni estu pretaj kunhelpi la organizon kies ĉefa tasko estas la disvastigado de Esperanto per ĉiuj rimedoj (kiuj rimedoj dependas de la Esperantistoj mem).

La kongreso de Strasburgo levis entuziasmon por pli streĉaj rilatoj inter la najbaraj landaj asocioj kaj ankaŭ inter niaj federacioj kaj lokaj societoj. La plioftigo de la renkontiĝoj inter la agentaj esperantistoj helpas al la disvastigado de la lingvo, kaj ebligas pli oftan praktikon al ĉiuj.

Por 1969/70, ni do konsilas ke la prezidantoj de la federacioj, kaj lokaj societoj pli ofte interrilatu k. organizu laborrenkontojn, k. aperigu federaciajn bultenojn por facile kunigi kaj konatigi siajn membrojn.

La konsilio de UFE faris gravajn decidojn rilate la organizon de pli firmaj rilatoj inter la nacia centro kaj la regionaj instancoj: estas antaŭviditaj stagoj por respondeculoj pri Informado dum la Kultura Semajno 1970. De nun, mi petas vin ĉiujn antaŭvidi la partoprenon de taŭgaj homoj kaj pripensi planon de renkontoj inter viaj grupoj kaj asocioj.

Lasu for la disajn agadojn, kaj kunhelpu UFE por pliaj sukcesoj!

André BOURDEAUX

Comme chaque année, la presse française a consacré de nombreux articles au 54 - ème Congrès Universe d'Espéranto à Helsinki.

La FRANCE et le SUD-OUEST, le PROVENÇAL, la VOIX DU NORD, NORD-ECLAIR, la MONTAGNE et NORD-LITTORAL ont donné l'essentiel des travaux de ce Congrès.

Le FIGARO du 2/8 titrait: "Sur le marché matrimonial du congrès espérantiste, les Japonaises sont les plus sollicitées":

"A Helsinki, où ils sont reçus pour la seconde fois...les espérantophones...ont été très sensibles au fait que les représentants du gouvernement et de la municipalité se soient donné la peine de leur parler dans leur langue "avec une accentuation parfaite".

Apolitiques, vivant dans la neutralité jurée, les espérantistes ont pourtant réuni l'Allemagne dans leur "kongresa libro". Qu'il soit de l'Ouest ou de l'Est, tout allemand est de "Germanujo" tout court!

Quant aux Chinois, ils brillent par leur absence.... En revanche les Japonais sont...plus de 60...Les demoiselles aux yeux bridés ne laissent pas les espérantistes indifférents. On relève...six mariages de jeunes nippones avec des occidentaux allemands surtout.... Dans certaines familles, on en est à la seconde sinon à la troisième générations d'unions internationales...

....Nous avons pu nous entretenir avec le Dr Chiussi (qui) parle neuf langues. Il a appris l'arabe parce que "ça lui manquait",... Puis il a traduit le Coran en Espéranto. C'est un volume de 700 pages.... qui pèse 1 kg 500 !....."

Le 5 août le même journal donnait connaissance des conclusions du Congrès:

(suite page 68)

# VIVA DE LA GRUPOJ

ANTIBES - 10 lernantoj sekvis la kurson de S-ro Lanzo, kiu ankaŭ instruas en diversaj urbetoj de la regiono. Depost tri jaroj, li instruis 120 personojn; el ili 12 sukcese trapasis la ateston pri lernado; kvar aliaj partoprenis la kurson en Grésillon.

Dank' al la afableco de S-ro ETIENNE, organizanto de la diversaj foiroj en Cannes, St-Raphaël, Antibes, laŭ la petoj de S-roj Lanzo kaj Isnardon, la grupo de Cannes zorgis senpagajn budojn en tiuj tri urboj. La verda flago flirtis super la tegmento de la foiro en Antibes. Tiamaniere, oni faris bonegan propagandon, kaj oni varbis novajn esperantistojn. La foto montras kelkajn esperantistojn akceptitaj de la foiro en Antibes. Ni rekonas S-ron Lanzo (maldekstre) kaj S-ron Etienne (dekstre). S-ro Isnardon fotis.

ARRAS - La gazeto de la instruistaj seminarioj publikigis jam 4 artikolojn pri esperanto kaj lingvaj problemoj. Pluraj francaj ĵurnaloj favore menciis la referaton de E. Plutniak.

BAUGE - Kiel ĉiu scias, Baugé estas la franca urbeto ĉe kiu staras la kastelo "Grésillon".

Komence de julio, sekve de informprelego en la teatro de Baugé, aranĝita de la Esperantista Kulturdomo, dek kvin gelernantoj tuj aliĝis al ĉiuvespera kurso kaj kontentige progresas.

Ne estas utopie esperi, ke baldaŭ la esperantista-grupo en Baugé fariĝos grava kaj modela en Francujo.

HOUDAIN - La 9-an de marto 1969, la "Foyer des Jeunes et d'Education permanente" okazis E°-tago



kun ekspozicio laŭ la temo "Esperanto en la nuna mondo".

LE MANS - En 1968-69 okazis kurso en la Teknika Liceo, kun partopreno de 25 lernantoj. Dum akcepto de Bulgara vizitanto, ili havis la tujan okazon uzi la lingvon.

Verŝajne venontjere okazos du kursoj en tiu liceo, kaj eble unu en la urbo mem.

LILLE - 80 geesperantistoj el 4 landoj sukcesigis la E°-tagon dum la Internacia Komerca Foiro. El la decidoj: regiona kunveno okazos en oktobro kaj Tournehem estas la loko, kie la federacio organizos la "markolan kongreson" en 1970. Krome, estis raporto pri la inaŭguro de esperanto-strato en Sint-Kruis (Belgujo) kaj studvojaĝo en Leningrado.

PERPIGNAN - La 8-an de Junio, la "tago de Esperanto" multe sukcesis, kun la ĉeesto de pli ol 100 personoj francaj kaj hispanaj.

S-ro LLECH-WALTER legis la leter-salutojn de diversaj organizaĵoj kaj de samideanoj el ambaŭ landoj.

Poste, S-ro SANCHO-IZQUIERDO, el Zaragoza, prezidanto de H.E.F. parolis pri la historio de la movado en Hispanujo.

Pine, D-ro ALBAULT, prezidanto de U.F.E. parolis pri Esperanto kaj evoluado de la lingvoj tra la mondo;





lian festperoldaon varme aplaudis la partoprenantoj.

Post honorvino, oferdonite de la Deputito-Urbestro de Perpignan, kaj bonege kaj amika bankedo, okazis vizito de la ŝipo "Lydia", inter Le Barcarès kaj Leucate.

Tiu internacia renkontiĝo ebligis plifirmigi la ligilojn, kiuj jam ekzistas inter la esperantistoj el ambaŭ flankoj de la Pireneoj.

Venontan jaron, la hispana-franca renkontiĝo okazos norde de Hispanio.

ROUBAIX - 10.000 personoj vizitis la ===== feston de la Junularo, kie ekspoziciis la E°-rondo. Oni elmontris aliajn esperantaĵojn (poŝtmarkojn kaj specialajn stampojn) dum la regiona filatela ekspozicio.

VALENCIENNES - La klubo festis en ===== Germanujo la dekadetrevenon de la ĝemeliĝo kun la E°-grupo en Düren. Dudeko da lernantinoj trapasis, en Lille, la elementan ekzamenon.

ĤHO PRI GRÉSILLON  
=====

Veronika kaj mi venas en Grésillon la 4-an fojon kun Martena Got kiu venas la unuan fojon. Matene ni lernas dum la birdoj kantas, kaj la suno brilas. Ĝoje, je 12h30, ni iras

manĝi kun granda apetito. Posttagmeze, Baugé, La Flèche, Grésillon kaj ĝia banejo akceptas nin. Venu al Grésillon. El ĉiuj ĉambroj oni vidas belan pejzaĝon. Vi povas tendumi, se vi volas. En la vespero, ni rigardas diapozitivojn pri Kanado, ni kantas; povas esti, ke ni havas librovesperon, aŭ Germano parolas pri sia lando. Vi povas rigardi belan pupteatron. Germana sinjoro tre bone faris tion. La vespero finiĝas, vi surpriras al via dormoĉambro, kaj kiam vi estas en la lito, vi estas kontenta pri via tago. Povas esti, ke vi iras al Le Lude, al la teatro. En la dimanĉo povas veni surprize esperantistoj. En Grésillon, ciam estas surprizoj! Tio estas nia vivo en Grésillon.

Vivu Esperanto, Grésillon k. S-no Vincent!

Lisbeta SCHREIBER  
13-jara knabino  
Les ANDELYS

oo

### REZULTOJ DE LA NACIA KONKURSO

Partoprenis ĝin nur sep personoj Sendube, la aliaj, kiuj aliĝis, trovis la enigmojn tro malfacilaj. Ĉar, neniu el la konkursintoj veturis al Helsinki, la du unuaj premioj ne estis eljuĝitaj.

Jen do la rezultoj:

3a premio: Albumo Thisude kun 375 neuzitaj francaj poŝtmarkoj (valoro 60 F.) al Sro GILOTEAUX lucien (Croix).  
4a ĝis 7a premioj: 10 F. da libroj mendeblaj ĉe U.F.E.:  
S-ino RIGAL, Les Vendanges, avenue de la République (27) LES ANDELYS ;  
F-ino RIGAL, sama adreso;  
F-ino PANNIER V. 13, rue Sadi-Carnot (LES ANDELYS)  
F-ino BONNET S. (6 Boulevard Néhou (27 - LES ANDELYS).







# RECENZOJ

KIO ESTAS SPIRITISMO? de A. Kardec -  
===== el la franca  
originalo tradukis P.C.N. kaj I.G.B.  
Brazila Spiritisma Federacio en Rio-  
de-Janeiro - 161 paĝoj.

Tiuj, kiuj deziras koni spiritis-  
mon aŭ observadi evoluon en tiu dok-  
trino, sen iu ajn dubo legos tiun  
verkon kun plezuro kaj intereso. A.  
Kardec studadis tiujn spiritismajn  
faktojn de 1857 ĝis 1869.

Fenomenoj, rilate al halucino,  
magneta fluidaĵo, reradiado de la  
penso, somnambula stato estas anali-  
zitaĵoj, kune kun problemoj kies sol-  
voj estas troveblaj per la spiritis-  
ma doktrino: Flureco de la mondo, pri  
la animo, la homo post la morto ktp.

Ĉu vi estas adepto aŭ ne, vi ne  
povas ne interesiĝi pri tiuj aferoj,  
kiel problemoj internaj aŭ eksteraj,  
laŭ via propra vidpunkto. Eĉ se vi  
opinias, ke ili estas kreitaj per  
fantazi-povo de niaj cerboj, tiuj  
problemoj restas interesaj laŭ psi-  
kologia vidpunkto.

Robert MARTIN  
=====

BONE! Poemo de l'Oktobro, de V. MA-  
===== JAKOVSKIJ. El la rusa tradukis  
K. Gusev. Eld. Komisiono de Sovetaj  
Esperantistoj, Moskvo 1967 - 108 p.;  
ofsetita.

Estas bedaŭrinde, ke la kvalito  
de la papero ne estas bona, ĉar la  
poemo mem, unu el la ĉefverkoj de la  
granda poeto Majakovskij estas eks-  
terordinare kaj povoriĉa etoso.

La ŝtatoj de la rusa lingvo  
certe ŝatos legi kaj kompari la ori-  
ginalon kaj la esp. tradukon. Tiu la-  
boro ĉiam estas fruktodona kaj unu  
fojon pli la legantoj kaj komparan-

toj komprenos ĝis kia grado Esperan-  
to taŭgas por poezi-tradukoj:

"Dormu, kompanoj,  
kviete,  
Pace ripozu sen ĉes'...  
Dornos ni nin  
bajonete  
Kontraŭ  
invad'  
kaj agres'.

Je la fino de la poemo, 8 paĝoj de  
komentoj klarigas multajn liniajn  
laŭ literatura kaj historia vidpunk-  
toj.

Robert MARTIN  
=====

ULENSPINGEL - tio estas Strigspiegulo  
=====  
traduko de P. Wolrug, Vulpo-Amster-  
dam 1967 - 16 paĝoj, ilustrite: 5 F.

"Pri lia vivo kaj fiaj agoj, kaj  
la strangej aventuroj, kiujn li ha-  
vis, ĉar li neniam evitis eblan fri-  
ponaĵon", vi legos tiun etan libron  
kaj vi admiros la kelkajn ilustra-  
ĵojn el la antverpena eldono de ĉ.  
1500!

Le aventuroj de Strigspiegulo el-  
venis el germanaj regionoj kaj rapi-  
de fariĝis konataj tra tuta Eŭropo.  
Oni povas diri, ke Strigspiegulo, nun  
estas eŭropa heroo.

Mi opinias, ke ni devas subteni la  
bonegan entreprenon de "Vulpo-Ams-  
terdam" kiu aldonis al nia riĉa li-  
teraturo tre valoran, brilan perlon.  
Antaŭen sur la sama vojo.

Robert MARTIN  
=====

LA MIRINDA ELIKSIRO - J.H. ROSBACH -  
===== Abyhøj, Dansk -  
Esperanto-forlag 1968, 98 p. 8 F.

Eble vi memoras la verkon "Homoj kaj  
Riveroj (1957)". Do, al vi mi ne be-



zonas prezenti Johan Hammond Rosbach kies talento rikoltis merititan sukceson. Nun, aperis de li skribitan novelaron, per kiu vi facile kontrolos la ĉiam valoran bonhumoron, la spritan plumon, la foje satirajn foje humurajn rakonto-kvalitojn de la aŭtoro. La menuo de la bongusta manĝo estas tre diversigita, ĉar entute vi ĝuos dekkvar pecojn!

"Dumkongresa epizodo" vekos delikate nuancan nostalgion ĉe kelkaj el ni, same kiel "Rozburgonoj" kaj "Inkmakulo", sed ne por la samaj kaŭzoj. Kaj la "Ruĝa slipo" permesos al vi ridi, rideti, ridegi laŭ viaj subkonsciaj - aŭ superkonsciaj - inklinoj!

La lingvo, kiel kutime ĉe veraj verkistoj, estas samtempe simpla kaj signifoplena, densa kaj malpeza, klasika kaj libera.

"Komence la profesoro dormis sur la sofo, sed mi kompatis lin, ĉar lito ĉiam estas pli bona ol sofo (p. 49a).

Do, mi konkludas parodie: "Komence la leganto dormis sur sia gazeto, sed mi kompatis lin, ĉar "La Mirinda Eliksiro" ĉiam estas pli bona ol gazeto"; do, mi konsilas al mia leganto malfermi sian mensan buŝon kaj trinki paĝ-kuleron post paĝ-kulero de tiu vere "mirinda eliksiro". Vivu bone!

Robert MARTIN  
=====

FORTOJ DE L'VIVO (la movado, literatura originala kaj tradukita, eseoj, la lingvo, scienco kaj tekniko) riĉe ilustrita per 120 fotoj kaj desegnaĵoj, 208 paĝoj, 147 x 209 m/m - Fondumo Esperanto - Helsinko 1967. Prezo (broŝ.) 12,50 F.

Por honori la 60 - jaran esperantistecon kaj 75-jaran aĝon de VILHO SETÄLÄ, membro de la Akademio de Es-

peranto, estis decidite publikigi, kolekton de liaj verkoj, originalaj kaj tradukoj, aperintaj en diversaj periodaĵoj. Tio estas nun en formo de pli ol 200-paĝa libro, bela verko diversa kaj varia laŭ la enhavo kaj la aspekto. La libron ornamas multajn ilustraĵoj, plejparte fotoj de la aŭtoro.

Kvazeù naskiĝtagan donacon, Vilho Setälä ricevis samtempe gravan aprezon en formo de subvencio por daŭrigi siajn studojn pri vortara statistiko, kiun ni konas el la studo en Esperantologio I, 1 (Kopenhago 1949). La subvencion donis Finna Scienca Akademio.

La multnombraj amikoj de V. SETÄLÄ ĉie en la esperanta mondo volos subteni la klopodojn, kaj fari omaĝon al li per mendo de la verko.

Simo RAUMAVIRTA  
=====

XX

JEFO...TEJO...JEFO...TEJO...JEFO...T  
=====

En STRASBURGO, la francaj gejunuloj elektis novan estraron:

Prezidantino:  
F-ino TRIOLLE, résidence Consolat, bâtiment A, cage J, 358 chemin du Littoral (13-05) MARSEILLE

Vicprezidantoj:  
S-ro KUBLER Roland, 20 rue du Ruisseau (68) RODEREN p. THANN

S-ro TRESORIER, Le Chanois-Chalezeules (25) ROCHE-lez-BEAUPRE

(rilatoj kun TEJO)  
S-ro LLOANCY Robert, 42 Boulevard de la République (47) AGEN

Sekretario:  
S-ro CATIL Jo, quartier Coquillard, (26) ROMANS

Kasisto: S-ro GROSMAN André, 3 r u e

de Bretagne (68) VIEUX THANN

Ĉiujn informojn, raportojn, rilatojn de gejunuloj, oni sendu rekten al la Sekretario, laŭ la supra adreso.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

En LYON, la 11-an de Majo, la estrarenoj kunsidis kaj decidis ordigi la membraron por plibone rilati kun la membroj.

S-ro KUBLER okupiĝos pri la kunordigado de regionaj renkontiĝoj en Lyon, Valence, Arles, kaj ankaŭ en aliaj urboj laŭ proponoj ricevotaj.

Samtempe, okazis eta interŝanĝo kun la gejunuloj de Lyon, dum kiu ĉiu pripensis agi laŭ la eblecoj por plani renkontiĝon.

-i-i-i-

La 25-a I.J.K. en Tyresö akceptis la jenan deklaron:

"En pluraj prelegoj kaj diskutgrupoj kun la ĝenerala temo "Junularo kaj socio", ni pristudis la nuntempan radikalajn ŝanĝon de la rolo de la junularo en la socio, kiu montriĝas en intelekta kaj politika mobilizo de la junularo.

La mobilizo okazas ĉefe pro sento ke la libera evoluo de la individuo estas pli kaj pli endanĝerigata de la establitaj ordosistemoj.

La establitajn ordosistemojn subtenas du tendencoj: unue, malaktualaj kaj tro normigaj konceptoj pri la homo, due, la rapide evoluanta teknologio, kiu emas detrui kaj anonimigi la individuecon, detrui la fizikan ĉirkaŭaĵon de la homo, kaj subfosi la homan psikon.

La lingvo estas realaĵo intime ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj. Tial, ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj.

Se oni konsekvence aplikas la koncepton pri konservo de la integreso

de la individuo, oni nepre venas al malaprobo de lingva kaj kultura diskriminacioj en ĉiu formo, al malaprobo de ĉi u tiel nomata solvo de la lingva problemo, k i u baziĝas s u r diskriminecio, k a j al konstato, ke oni ne sufiĉe atentis la detruadon de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj. T i u detruado estas nenio alia ol instrumento de lingva imperiismo.

En nia propra laboro, ni antaŭvidas esploradon kaj informadon pri la neadekvateco de la monda lingva situacio, kaj pri ĝia kunligo kun la detruo de la homa personeco en la nomo de teknologia kaj ekonomia programo.

La mobilizo de la junularo estas subtenenda kaj partoprenenda batalo por la digno de la homo.

La estonta agado de TEJO inkluzivos lanĉon de aktivecoj, kiuj celos plivastigi la dimension de la individuo en la socia kaj teknologia evoluo. Tiuj aktivecoj baziĝos sur la specialaj trajtoj de TEJO, kiel organizo laboranta por forigo de ĉia misuzo de lingvoj por ekonomia, kultura aŭ politika subpremado.

Ni alvokas ĉiujn homojn kaj junularajn organizojn al solidariĝo kaj laŭeble kunlaboro en tiu agado de T.E.J.O."

-i-i-i-i-i-

La nova estraro de T.E.J.O. estas  
Prezidanto: H. TONKIN (Usono),  
Sekretario: S. ĈOLIĆ (Jugoslavio),  
Kasisto...: Ulla LUIN (Svedujo),  
Membro....: Ingrid CARLSSON (Svedujo)

=====

La Liona Junulara Sekcio de JEFO organizos SEMAJNO-FINON en LYON, la 11/12-10.1969, en Junulardomo 101 Bd des Etats-Unis - Lyon 8 - La kostoj estos 19 F. Informiĝu ĉe Hervé GONIN 20 Av.St-Exupéry-Villeurbanne (69).

(3an kaj 4an de Aŭgusto 1969 en DIPOLI/OTANIEMI)

K O N K L U D O J

pri la eblecoj por la paralela enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj  
Universitatojn de diversaj landoj

La Tria Lerneja Konferenco, kiu okazis en Helsinko kaj kiun partoprenis delegitoj de 17 landaj asocioj de UEA (Aŭstrujo, Belgujo, Britujo, Bulgario, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Germanujo, Hungarujo, Israelo, Jugoslavio, Pollando, Svedujo, Svisujo, Kanado, Nederlando, Norvegujo kaj Usono) kaj de 12 landaj sekcioj de I.L.I.E. (Aŭstralio, Britujo, Bulgario, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Germanujo, Hungarujo, Nederlando, Pol-

lando, Svedujo, Svisujo kaj Usono) kunne kun oficialaj reprezentantoj de 7 registaroj (Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Finnlando, Italujo, Pollando kaj Svedujo) pritraktis, kiel ĉefatemon, la eblecojn por vastigo de la instruado de la Internacia Lingvo (Esperanto) en diversaj landoj per interŝtata konvencio pri paralela enkonduko de la instruado de tiu lingvo en difinitan nombron de lernejoj kaj universitatoj.

La Konferenco aŭdis la raportojn de 1) Lernejestro R. MARKARIAN, ERD, MA, (Britujo) pri la juraj eblecoj por Esperanto-instruado en 25 landoj; 2) Rektoro SONNABEND (Germanujo) pri la instruado de Esperanto en la jaro 1968/69 3) Prof. D-ro LAPENNA (Britujo) pri la instruado de Esperanto sur universitata nivelo; 4) S-ro G. BECKER (Germanujo) pri la kunordiga rolo en Esperanto-instruaferoj de la Konsulta Komisiono pri Lernejoj de UEA.

La Konferenco diskutis tiujn raportojn kaj trarigis lastatempe verkitajn dokumentojn de C.E.D. en Londono, kiuj rilatis al la konferenca temo. Ĝi poste diskutis la eblecojn de diversaj landoj partopreni en interŝtata konvencio aŭ al-

ia internacia interkonsento pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj pri la eblecoj por la vastigo de la instruado de tiu lingvo sur landa nivelo.

Kvankam pluraj landaj aŭ registaraj reprezentantoj povis certigi la aktivan intereson de siaj landoj pri la ideo de la paralela enkonduko de Esperanto-instruado - ne nur simple kiel aldona fremda lingvo, sed pli bone kiel unika helpilo al edukado al internacia interkompreniĝo - la Konferenco tamen, konstatis, ke ankoraŭ ne alvenis la ĝusta tempo por la traktado de formala interkonsento, kvankam oni daŭre studas la terenon tiurilate aparte en landoj, kie kondiĉoj en baldaŭa estonteco povos esti favoraj kaj rekomendas, ke la ĉefa agado en la Esperantista instruista medio, por la venontaj monatoj, estu la enlanda vastigado de la instruado mem per:

- 1) la enkonduko de Esperanto en la studprogramojn de ĉiam pli kaj pli da lernejoj, inkluzive tiujn por estontaj instruistoj,
- 2) la oficialigo, flanke de edukministerioj, de ĉiunivelaj studprogramoj,
- 3) la certigo al ĝelernantoj de Esperanto de taŭgaj ekzamenoj, di-

plomoj, k. s. same kiel ili spertas kaj ricevas por aliaj lernejoj temoj

4) la oficialigo, flanke de edukministerioj, de jam ekzistanta supera ekzameno en kiu devas sukcesi eventuala Esperanto - instruisto, aŭ la starigo de tute novaj ekzamenoj por Estontaj Esperanto-instruistoj, se eble en kunlaboro kun la edukministerio mem;

5) la eldonado en ĉiu lando de instrumaterialoj kaj lernolibroj modernaj laŭ aspekto kaj enhavo, kiuj baziĝas sur la oficialaj instruprogramoj;

6) la pligrandigo de la reto de Esperanto-instruantaj lernejoj, kiuj partoprenas la projekton de Unesko "Asociiĝintaj Lernejoj".

7) La plifortigo de la kondiĉoj favoraj al plua enkonduko de Esperanto, se necese per leĝa dekreto, laŭ la modelo de la aktuala agado en Italujo, kies unu el la bazaj paŝoj estas la intensa kaj regula informado al gravaj oficistoj, parlamentanoj, k.t.p...

8) la utiligado, aparte en universitataj medioj, de la nova revuo "La Monda Lingvo-Problemo";

9) la starigo de lernejoj komisionoj precipe en landoj, kie ne estas I.L.E.I.-sekcioj;

10) la harmoniigo de la laboro de K. K.L., ILEI kaj landaj asocioj;

11) la utiligo por la preparado de kompetentaj instruistoj, de ĉiuj rimedoj inkluzive kursojn per radio, televido kaj gazetero, kaj de korespondaj kursoj sub la gvido de Landaj Esperanto-Asocioj;

12) la uzado, en Esperanto-instruado de la plej modernaj metodoj uzataj de la instruado de ĉiuj modernaj lingvoj;

13) kunlaborado de la landaj esperanto-instruistoj kun la neesperantistaj instruistaj sindikatoj.

(raporto sendita  
de S-ro G. TURIN

o  
o

oo

### N A C I A K O N K U R S O

Ekde la 1-a de oktobro 1969, estas starigita konkurso inter la aktivaj membroj de UFE (abonantoj al la RFE) kiuj plenumos la jenajn kondiĉojn:

- 1) loĝi en Francujo (pro la nuna neebleco sendi monon eksterlanden);
- 2) havi minimume la diplomon "Atesto pri Supera Lernado";
- 3) respondi ĉiujn enigmojn proponitajn en la R.F.E. antaŭ la 30-a de aprilo 1970;
- 4) sendi 5 F. plus afrankitan koverton kaj fotokopion de la plej alt-nivela esperanto-diplomo posedata al

S-ino J. VINCENT

(27) Les Andelys

CCP. 574.88.M. ROUEN

Por la jaro 1970 estos disdonitaj la jenaj premioj:

- 1) stipendio de 300 F. por vojaĝi al la U.K. en Vieno;
- 2) stipendio de 200 F. por vojaĝi al la U.K.;
- 3) kaj 4) stipendio de 100 F. por vojaĝi al la UK. aŭ al Grésillon;
- 5) ĝis 14) 10 F. da libroj mendeblaj ĉe U.F.E.

Rimarkoj: A) se la unue kaj due premiitaj ne intencos veturi al Vieno, iliaj premioj ne estos aljuĝitaj; B) en okazo de egaleco, venkos la konkursinto kun la pli alt-nivela esperanto-diplomo.

La 1-an de agosto mortis post kelkmonata grava malsano la fondinto

de Internacia Esperanto-Muzeo en Vien  
kortege konsilisto

# Hugo Steiner

en sia 92-a jaro. Li estis Honorprezidanto de la Unulgo „Internacia Esperanto-Muzeo en Vien“, Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio, Honora Prezidanto de Austria Esperanto-Movado, Honora Prezidanto de Austria Federacio Esperantista Fervojuista kaj honormembro de multaj aliaj organizoj. Li posedis la Honormedalon de ICK, la Austrian Honorkrucon por Scienco kaj Arto kaj diversajn aliajn en-kaj eksterlandajn distingojn.

La karan mortinton ni akompanis al lia lasta vojo la 7-an de agosto, je la 15-a horo el la funebra ceremoniejo de la tombejo en Korneuburg.

Wien, agosto 1969.  
Hofburg, A-1010 Wien

Lian memoron ni gardos por ĉiam kun amo.


**Internacia Esperanto-Muzeo**

Laŭ peto de S-ro Manceau, kaj post akcepto de S-ro Bernard, protokolinto, la punkto 10/d (paĝo 34a de RFE n°258 estas kompletigota jene:

”la teknikaj recenzoj en R.F.E. devas esti daŭrigataj, kaj la tiea rubriko devas evolui al ”teknika rubriko per Esperanto, kiu celus profesiulojn. Tiu rubriko en RFE estas la unua paŝo per kiu Esperanto eniru la teknikajn profesiojn”.

XX  
XX

S-ino S. ROUSSEAU, tre kortuŝita, dankas ĉiujn siajn geamikojn pro la esprimoj de simpatio, kiujn ŝi ricevis dum la restado en la hospitalo de Helsinki (julio 1969).



Cette affiche est à votre disposition aux conditions suivantes:  
10 ex. (40x60)...3,50  
10 ex. (30x40)...3,00  
**Commandes: A.FRANGEUL**  
**42 rue du Pré-Pigeon,**  
**ANGERS (49)**  
**Paiement: GROUPE ESPÉRANTISTE ANGEVIN CCP:**  
**NANTES 290.79**

- Cours permanent par correspondance de langue internationale "ESPERANTO"
- Ecrire à "Union Française pour l'Esperanto" 34, rue de Chebrol - 75 - PARIS (X)

# Parlez ESPERANTO

VOUS AUREZ DES AMIS DANS LE MONDE ENTIER !





(suite de la page 55)

"Cette résolution finale constate et déplore la multiplication des langues de travail dans les assemblées internationales... Elle souligne que l'Espéranto, par son caractère de neutralité favoriserait tous les pays, écarterait les vaines rivalités entre les petites et moyennes nations.... et éviterait tout risque de discrimination de la part des grands et supergrands".

LE MONDE (23 et 30-7) a rendu compte de l'assemblée qui s'est tenue sur le thème: "Le problème linguistique dans le cadre de la politique mondiale et les tâches des organisations d'Espéranto".

"Jusqu'au 2 août auront lieu des conférences ( Droit international et politique mondiale, De la forme et de la grandeur du monde, L'Espéranto et l'Islam, le Finnois et l'Espéranto, L'Information scientifique et la Documentation, etc.... Un théâtre d' Art International, dirigé par M. S? Flego, un congrès international d'a-veugles, des congrès d'enseignants, de cheminots, de postiers, de fidèles des cultes protestant, catholique et quaker, des concours de poésie et d'éloquence en espéranto, complètent le programme des manifestations....placées sous le patronage de M. Urho Kekkonen, président de la République Finlandaise.

OXOX OX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX OXOX

**ESPERANTO, BILINGUISME ET CULTURE...**

=====  
M. J. J. BRESSAND, promoteur d u fameux "Monde Bilingue", devenu "Fédération Mondiale des Villes Jume- lées" n'a jamais, on le sait, porté l'Espéranto dans son coeur, en dépit de certaines déclarations passées ou récentes.

C'est ainsi que le 7 Juin dernier interviewé à "France - Culture", au cours de l'émission "Le Monde Contemporain", le prophète du bilinguisme franco-anglais répondait à la ques-

tion de M.de BEER, co-réalisateur de l'émission, sur ce qu' il pensait de l'Espéranto: "les espérantistes nous sont très sympathiques!! D'ailleurs, ils ont le même idéal que nous. Mais qu' ils se retirent sur une île déserte et qu'ils reviennent nous voir d'ici à 2000 ans avec une culture!!

Notre ami BOURDEAUX protesta officiellement auprès des réalisateurs, qui lui accordèrent spontanément e t courtoisement le droit de réponse sur l'antenne. Cette émission e u t lieu le 21 Juin à 9h. et dura 3/4 d' heure. Participaient à cette sorte de "face à face": Jean de BEER et F. CREMIEUX, journalistes-réalisateurs de l'émission, et M. CHAMBON, Amba- sateur de France à Ceylan.

A.BOURDEAUX développa une argumen- tation fondée sur l'existence d'une communauté mondiale linguistique o- riginale, basée sur l' espéranto et démontra que cette langue, instru- ment de diffusion de la culture é- tait, a fortiori, capable de créer elle-même ses propres valeurs cultu- relles. Il mit en lumière les faits prouvant l' existence charnelle de cette communauté, s a presse, ses émissions radiophoniques, s a litté- rature (originale et traduite) etc..

Assez agressifs au début de l'é- mission, les réalisateurs reconnurent très vite le bien-fondé des argu- ments développés et convinrent " que nous avons des ennemis bien plus dangereux à combattre (sic!)

Ce fut, en bref, une excellente émission d'information s u r l'Espé- ranto, diffusée à une heure d'écoute intéressante. (La bande magnétique sur laquelle a été enregistrée cette émission est à la disposition des groupes qui en feront la demande).

oo

Ce numéro a été préparé le 17-IX- achevé d'imprimé le 25-IX et expédié aux abonnés le 27 septembre 1969

Le Gérant: BOURDEAUX

CPPP N°21755

SITEC Impr.188 Fbg St-Denis PARIS X°

